## INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO - LIGO

INFORMA BULTENO DE BRAZILA ESPERANTO - LIGO Boletim Informativo da Liga Brasileira de Esperanto Praça da República, 54 - 29 andar - Tel. 232-6309 20.211 - RIO DE JANEIRO - BRASIL

IMPRESSO

## MESAĜO AL LA BRAZILAJ ESPERANTISTOJ

Antaŭnelonge vizitis nin S-ro Ivica Ŝpoljarec (Ŝtef), funkciulo de Internacia Kultura Servo, el Zagreb, Jugoslavio, kaj kunaŭtoro de la nuntempe furora "Zagreba Metodo". Pri tiu ĉi temo, li eĉ prelegis en la sidejo de BEL la 26-an de majo de la kuranta jaro kaj, la 2-an de junio, pri "Hodiaŭa Jugoslavio". Poste, li entreprenis tutsolan vojaĝon al Bolivio kaj Peruo kaj tra diversaj brazilaj ŝtatoj. La 8-an de aŭgusto, antaŭ lia reveno al Jugoslavio, li denove vizitis nin kaj tiam li registris, en nia vizitlibro, la ĉi-suban belegan mesaĝon al la brazila esperantistaro:



"Post 3-monata vagado tra Brazilo, Bolivio kaj Peruo, mi konstatas ke mi fakte malkovris novan, mirakle belan kaj interesan mondon por mi mem. Kaj multe pli ol la fakto ke mia mondo pligrandiĝis, gravas ke ĝin plenigas sinceraj amikecoj de brazilaj geesperantistoj: el Manaus, Belém, Fortaleza, Recife, Salvador, Brasília kaj Rio de Janeiro.

Kvankam mi baldaŭ forvojaĝos hejmen, mi konscias ke ĉi tie mi lasos parton de mia mio, kun ĉiuj profundaj emocioj, sentoj, amikecoj, vidaĵoj kaj konatiĝoj naskiĝitaj dum la restado kaj vagado tra via lando.

Pli ol ĉio, mi dankas al ĉiuj kiuj senpretende donacis al mi parton de sia vivo-tempo kaj domo, kiuj helpis al mi realigi la vojaĝon, kaj kunkrei amikecon.

Al vi ĉiuj kiuj restas en "mia nova mondo", kaj laboras per kaj por internacia lingvo, mi elkore deziras bonan sanon kaj kontenton en la vivo kaj laboro.

Konsciu ke vi havas novan amikon!

Rio de Janeiro, 8.8.84

Ivica Spoljarec - (Stef)

## MALLONGE PRI LA BRAZILA MOVADO MALLONGE PRI LA BRAZILA MOVADO MALLONGE PRI LA B

III SUDBRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO - La Guberniestro de Santa Catarina, D-ro Esperidião Amin, estos la patrono de la III Sudbrazila Renkontiĝo de Esperanto, kiu okazos en Florianópolis, Santa Catarina, de la 16-a ĝis la 18-a de novembro (Pliaj informoj ĉe Associação Esperantista de Santa Catarina, Praça 15 de novembro, 21 sala 402, 88.000-Florianópolis, SC).

GAÜCA RENKONTIĜO - De la 7-a ĝis la 8-a de septembro okazos, en Porto Alegre, RS, la II-a Gaüca Renkontiĝo de Esperanto. En la programo, enestas diversaj interesaj prelegoj (Pliaj informoj ĉe ESPA, Rua dos Andradas 1137 s/1704, Porto Alegre, RS).

I SEMAJNO SPIRITISTA-ESPERANTISTA DE BANGU - De la 26a. de aŭgusto ĝis la l-a de septembro, okazis, sub la aŭspicio de Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga (Rua Silva Cardoso, 673, Bangu, 21.810-RIO DE JANEIRO, RJ) la Unuan Semajnon Spiritistan-Esperantistan de Bangu kun pluraj interesaj prelegoj de Celso Martins, Délio P. de Souza, Haroldo Silva, Paulo Andrade dos Santos, Alfredo Aragón, Chersoneso Galvão kaj Nelson P. de Souza.

SÃO ROQUE ESPERANTO-KLUBO - La 5-an de aŭgusto estis fondita São Roque Esperanto-Klubo, en São Roque, São Paulo, kiam okazis prelego de Prof. Elvira Fontes, de "Associação Paulista de Esperanto", pri "Esperanto kaj ĝia kreinto".

PRELEGO ĈE ROTARY - Nia S-ano José Rabello de Paula, la 8-an de aŭgusto, prelegis pri Esperanto antaŭ proksimume 50 membroj de Rotary Club da Tijuca(kvar talo de Rio), ĉe Tijuca Tênis Clube.

ESPERANTISTA DIMANĈO - Sub la iniciato de S-ano Augusto Marques de Freitas, okazos en Valença, RJ, la 16-an de septembro, la "Esperantista Dimanĉo". En la programo oni antaŭvidas inaŭguron de ekspozicio pri E-o, kunfratiĝan tagmanĝon, prelegon kaj radiprograman intervjuon (Pliaj informoj ĉe Centre Espírita de Valença, Praça 15 de novembro, 632, 27.600-VALENÇA, RJ).

DUMVIVA MEMBRO-AKIRASOCIO - Dumviva membriĝo al UEA ŝajnas utopio por 99% de la esperantistoj. Fakte ĝi kostas altegan sumon. Sed nun tio fariĝis pli facila, se vi aliĝas al la Dumviva Membro-Akirasocio kiun organizas S-ano George Otto Vaske (Rua Esperanto s/nº, 95760-KAI, RS).

PARANA INFORMILO - Ĵus aperis la unua numero de tiu informilo, eldonita de Parana Esperanto-Asocio (Rua Dr. Murici, 542 s/1201-1202, Curitiba, PR). La bul teno estas klare presita kaj zorge redaktita de Itacir Luchtemberg.

KLARIONO - estas la titolo de la informbulteno de Associação Alagoana de Esperanto (Av. Fernando Lima, Farol, 57.000-MACEIÓ, AL) kiu, interalie, informas nin pri la sinteno de la ŝtata guberniestro Divaldo Suruagy rilate al la internacia lingvo ("A confraternização universal é a grande aspiração da humanidade. E o esperanto é o instrumento mais eficaz à conquista desse objetivo maior").

## NOVAĴOJ PRI BEL NOVAĴOJ PRI BEL NOVAĴOJ PRI BEL NOVAĴOJ PRI BEL NOVAĴOJ PRI BEL

NOVAJ KURSOJ - La 11-an de aŭgusto, komenciĝis novaj enklasaj kursoj en la sidejo de BEL. Al la baza kurso, gvidata de Prof. May Bjeleveld, aliĝis 10 lernantoj kaj al la Perfektiga, gvidata de Prof. José Bonifácio, aliĝis 9 lernantoj.

VIZITO DE ANGLA SAMIDEANO - La 18-an de aŭgusto, vizitis nin S-ro John Green Soef, angla samideano, loĝanta en Londono. Tiam, li registris siajn impre sojn en nia vizitlibro: "Estas tre agrable trovi ĉi tiun koran gastamon en lando en kiu mi antaŭe konsideris min tute fremda. Kia mirige kaj bonege estas la afero esperanta! Mi kore dankas la esperantistojn de Rio pro la afablo kiun mi trovis, kaj deziras al ili bonan sukceson en la daŭrigado de la movada laboro".

PAROLIGA RONDO - Ekde aŭgusto, okazas, en la sidejo de BEL, ĉiusabate, de la 15-a ĝis la 16h30m, paroliga rondo kie oni diskutas ĝeneralajn temojn pri la esperanto-movado.

BEL-MEMBRARO/Stato je la 31/08/84

MS	$\underline{M-1}$	<u>M-2</u>	$\overline{\mathtt{DM}}$	BM	Entute
Ĝis 30/06 199	131	18	30	04	382
En julio 13	05	01	-	-	19
En aŭgust. 26	03	01		-	30
Ĝis 31/08 238	139	20	30	0 4	431
En 1983 288	135	23	30	02	478

DONACOJ AL BEL, EN AÜGUSTO: Ely Figueira (RJ) - Cr\$ 2.000,00; Wilson P.Des-landes (RJ) Cr\$ 180,00; Francisca Martos (SP) Cr\$ 200,00; Ruy Cavalcanti de Albuquerque Cr\$ 760,00. Al ĉiuj, koran dankon!

LIVERITAJ DIPLOMOJ - En julio/aŭgusto, estis liveritaj 13 diplomoj: 12 de la Baza Kurso kaj 01 de la Perfektiga.

ELDONITAJ DOKUMENTOJ - en julio/aŭgusto estis eldonitaj: 87 leteroj, 10 fak turoj, 146 enspeznotoj, 15 rembursaj enspeznotoj.

ALIĜOJ/ABONOJ - en julio/aŭgusto estis registritaj 5 aliĝoj al UEA kaj 3 abo